**Germana Esperanto Asocio**
**landa asocio Meklenburgio / Antaŭpomerio**

# RAPORTO
## pri la Somera Esperantista Feria/Familia Tendaro 2005
## 28-a S E F T 2005

La 28-a SEFT okazis de la 16-a de julio ĝis la 24-a de julio 2005 sur nia tradicia tendejo apud la Dreetzsee (drec-lago) de la regiono ĉirkaŭ urbeto Feldberg, 120 km norde de Berlino.

## 1. Partopreno

76[1] personoj el Aŭstralio, Litovio kaj germanaj federaciaj landoj: Berlino, Brandenburgio, Meklenburgio, Turingio, Nordrejn-Vestfalio.
Staris 35 tendoj, 4 loĝoĉaroj, 1 loĝomobilo, 21 aŭtoj, kaj 24 bicikloj. ....
**Bestoj**: surlokaj vespoj ĉijare nur malofte ĝenetis nin.

## 2. Aranĝoj

**Migradoj kaj Ekskursoj:**
- migrado al Carwitz, muzeo pri Hans Fallada (aŭtoro)
- remigrado tra Thomsdorf
- migrado kaj biciklado al „Krüseliner Mühle"
- biciklado al Carwitz, por frandi glaciaĵon
- nokta migrado al Thomsdorf

**Komunaj manĝoj**




- "Kaldrona supo" farita de multaj helpantoj.
- Bivakfajro apud Dreclago, bakado de "bastona kuko"[2] kun samtempa kradrostado (specialaĵo tie estis kradrostitaj fragoj en aluminiaj saketoj, malgrandaj bananoj kaj aluminiaj kusenoj enhavantaj fumitan kaj nefumitan fiŝojn)[3]

## 3. Novaĵoj

- Je la 10a de majo 2006 naskiĝis la dua bebo Max de Conny kaj Stefan. Gratulon!
- Je la 14a de decembro 2005 subite mortis nia Eckart.

## 4. Amuzaĵoj

- **Kafoklaĉo** fariĝis jam bona tradicio dum SEFT. Ĝi okazis ĉiutage kun sennombraj kaj interesaj prelegoj kaj diskutrondoj pri plej diversaj temoj kaj homoj.
- **Luda rondo:** Dum ĵaŭda antaŭtagmezo en la tendego okazis diversaj ludoj.
- **Flanofesto:** Tre ŝatata kaj bongusta okazo estis vespera festo de **„Patkukoj"**, kiujn rostis ĉifoje Steffen Raabe, Maxi kaj Ulrike laŭ Klaasa recepto. Dankon!

---

[1] Ĉu tio ĝustas?
[2] Germane: Knüppelkuchen
[3] Demandoj pri la recepto estu direktataj al Nils.

- **Fabelhoroj:** Ĉiuvespere por infanoj kaj interesuloj. Bedaŭrinde ofte en germana lingvo. Kelkajn tagojn rakontis Maxi, poste Sabinjo, kaj René Philipp okupiĝis pri la diapozitivoj.
- **Adiaŭa vespero:** kulmina kaj lasta programero kun riĉa, varia bufedo.

## 5. Distraĵoj

- **diversaj sportoj**: retpilkado, indiako, piedpilko, naĝado, tabloteniso kaj iu stranga ludo, kies nomo ankoraŭ ne estis tradukita.
- **ludoj:** "homo, ne ĉagreniĝu", diversaj kart-ludoj,

## 6. Vetero

- Nuboj tre oftis, precipe merkrede kaj ĵaŭde. Merkrede multe pluvis, sed ĵaŭde eĉ foje pluvegis, tiel ke kelkaj tendoj subakviĝis kaj la tenduloj devis fuĝi.

## 7. Informoj

- La 29a SEFT okazos: **de la 12-a ĝis 19-a de aŭgusto 2006** sur la tendejo ĉe Dreclago. Individua aliĝo ĉe la tendeja oficejo ne necesas. Ni mendas entute!
- La adreso de tendeja oficejo:

  **Campingplatz „Am Dreetzsee", s-ro H.-J. Döhring**
  **Thomsdorf 37**
  **17268 Boitzenburger Land**
  **telefono: (03 98 89) 7 46**
  **fakso: (03 98 89) 5 51 06, (03 98 89) 5 03 93**
  **reto: www.dreetzseecamping.de**
  **Retpoŝto: dreetzseecamping@t-online.de**
- Jam nun invitu viajn geamikojn precipe tiujn el aliaj landoj. SEFT estu kaj internacia kaj solidara! Bonvolu sendi nian invitilon al geamikoj, kluboj kaj petu publikigon en E.-gazetoj, kluboj!

## 8. Teknikaĵoj

- **Niaj retadresoj:** Dum tuta jaro sur jenaj retpaĝoj troviĝas detalaj informoj pri SEFT: **www.seft.de** kaj **www.esperanto-nb.de**.

- Se vi ankoraŭ havas **demandojn al la organizantoj**, do sendu tiujn al:

| | | |
|---|---|---|
| nils.pfennig@seft.de | Nils Pfennig | Organizado |
| tlustulimu@web.de[4] | René Philipp | Raporto, fabelhoroj |
| h.a.l.o@12move.de | Olaf Malcherek | Kaso |
| silke.ursel@seft.de | Silke Ursel | Adresaro |

- Krome ni petas vin pri **fotoj de SEFT 2005**[5], por meti ilin sur la paĝarojn de **seft.de**. Sed bonvolu paki ilin en zip-formato kaj malgrandigu ilin al 380x260[6] laŭ grando! Por koloraj fotoj ni preferas la jpg-formaton, por nigre-blankaj sufiĉas la gif-formato. Sendu ilin al nils.pfennig@seft.de (por SEFT.de), atentante eventualan poŝto-kestan limon de 4MB kaj aldonante informojn kion vi fotis, se ne rekoneblas sen via sciigo. Bonvolu antaŭanonci vian sendaĵon, por ke eblu malplenigi ĝin!
- Se vi havas multajn fotojn por la supre menciita paĝaro, do bonvolu sendi kompaktdiskon al la redaktanto.

- **Multajn salutojn al ĉiuj kaj ĝis revido en la jaro 2006**
- **viaj SEFT-organizantoj**

---

[4] Estiĝis el fantaziaĵo
[5] Aŭ eĉ de antaŭaj jaroj, sed tio ne tiel gravas kiel por la plej aktuala aranĝo.
[6] Vi ne devas uzi ekzakte ĉi tiun grandecon, nur gravas ke ĝi proksimu al ĉi tiuj valoroj kaj la proporcioj similu!